ESPERANTO - ASOCIO DE BRASÍLIA - EAB
CAIXA POSTAL 11-1124
70084 - BRASÍLIA - DF.
BRAZILO

1987

# TAGIĜIDO

kiam
(Aperas ĉiam la "patro", pro manko de efektivaj kunlaborantoj, ne povas ĉeesti)

## . PLI UNU KLASO FINAS ESPERANTO-1-an

Sub la gvidado de la instruistino Jane Gaia, sukcese finis la kurson Esperanto-1-an ĉe EAB la gelernantoj André Barboni, Eduardo Fabretti, Hermano Studart, Lurdes Piantino, Nelson Virgílio kaj Manoel Pinho, kiuj en la tago 28-a de septembro ricevis siajn Diplomojn. GRATULON K ANTAŬEN!

Aliflanke, du aliaj klasoj gvidataj de Roberto Ferreira kaj Macário daŭrigas siajn studojn.

## . REZULTIS BONE NIA EKSTERORDINARA KUNVENO

Ĉeestante 14 EAB-anoj, okazis en la ĵaŭdo 1-a de oktobro eksterordinara kunveno de EAB, kies enhavo estas la jena:

a) EAB proponas la malfermon de Studgrupo por ĉi tiu semestro, direktita al tiuj kiuj finis Esperanto-1-an aŭ -2-an. (Vidu ĝeneralajn priinformojn kaj Programon en la lasta paĝo).

b)Estas aprobita la ideo reokazigi la monatan kunvenon ĉe restoracio en la unua sabato de ĉiu monato. La kunvenejo nuntempe estas LA PIZZA, 107 Sude. Nu, ĉiuj estu tie en la 7-a de novembro por agrabla babilado esperante,aŭ almenaŭ esperantisme!

c) Aprobante proponon de Roberto Ferreira, la asembleo decidis krei specialan ano-kategorion por pagi EAB-deĵoriston, kiu laboros almenaŭ dum la mateno aŭ dum la vespero, ebligante tiel la malfermon de nia Asocio tage kaj ĉiutage. Ĉe la Ĉeestantaro EAB sukcesis tuj Cz$ 600,00 monate. Tamen, ĝi sukcesendas ĉirkaŭ Cz$ 3.000,00. Tiuj kiuj pretas pagi Cz$ 50,00 monate (la takso fiksita) fervore esperas alies nonhelpon por ke ni efektive trafu tiun ĉi celon.

Paralele al ĉi tiu propono, stariĝas tiu ke ni luu la EAB-lernoĉambron dum parto de la tago (evidente la luanto ĝin uzos lernoĉambre). Do, se vi, leganto, scias kiu volas lui lernoĉambron tiun kontaktigu al ni.

."MEDALHA DO MÉRITO ALVORADA" POR ESPERANTISTOJ

La Ŝtatestro de Federacia Distrikto je la tria fojo oferas al esperantisto de Braziljo la Medalon "Mérito Alvorada". Pasintjare ĝin ricevis Neima Adorno (EAB) kaj Néia Lúcia (BEL). En la baldaŭa vendredo (16/10/87 je la deka matene), kune kun diversaj aŭtoritatoj pri kulturo, artoj, scienco, mistikismo, k.a., ĝin ricevos Afonso Camboim, Prezidanto de EAB.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

Pro manko de deĵorantoj kaj de aliaj kunlaborantoj esperantistoj, ni rezignis priesperante ekspozicii ĉe Parlamentejo (tiea Biblioteko). Ĉar Movadoj kiel nia, kiu tiom necesas disvastigon, ne rajtas tiajn rezignojn kaj ĉar la spaco por Esperanto tie ankoraŭ estas aperta, ni invitas kontakti nin tiuj kiuj volas kunlabori pri ĉi tio.

********************************************************************

PROGRAMO DE STUDGRUPO EAB POR LA DUA SEMESTRO DE 1987

Komencaj informoj:

loko/horo: EAB je la Sabatoj de la 10:30-a ĝis la 12:00-a h.
komenco: 17-a de oktobro
fino: 19 de Dezembro
hordaŭro: 15 horoj
prezo: Cz$ 500,00
rimarko: la kunordigado estas de la grupo mem kaj la supergvidado estas de Afonso Camboim.

1. PROCEDOJ ĜENERALAJ:

. Je la fino , ĉiu partoprenINTO estos leginta unu libron pri kiu li estos farinta resumon aŭ simplan komentarion (unu tajpitan paĝon);
. en ĉiu renkontiĝo unu lernanto lotita respondecas pri la speciale pri la konsultoj al la vortaroj;
. en ĉiu renkontiĝo unu lernanto lotita notos la erarojn prononcajn kaj ilin montras al la grupo;
. en ĉiu renkontiĝo unu lernato lotita notos la gramatikajn

erarojn ( skribas la frazon eraran kaj substrekas la eraron por posta prezentado al la grupo;

Rimarkoj: . Du forestoj implicas la ne-ricevon de la Diplomo.
. Ĉi procedoj povas esti perfektigitaj de la grupo mem.

2. PROCEDOJ SPECIFAJ:

. 1-a renkontiĝo

a) ĝenerala klarigo de Afonso Camboim

b) lotado de libroj, unu por ĉiu grupano, resumotaj aŭ komentariotaj de ĉiu ĝis la 6-a de decembro;

c) redaktado de unu paĝo pri la temo: "Ĉu vi apogas la mortpunon? Jes? Ne? Kial?"

. 2-a renkontiĝo

a) Ĉiu grupano faras kvin frazojn el la plej ofte uzataj de si ĉiutage en la portugala lingvo. Poste interŝanĝas la paperojn havantaj tiujn frazojn. Ĉiu tradukas en esperanton la frazojn de la kolego kaj faras tion en tri manieroj esperante direblaj.

(KIEL VI BONE RIMARKAS, LA MONTINTO ERARIS LA TASPINTON; EN LA LASTA PAĜO ESTAS NUR LA FINO DE LA PROGRAMO

---

REMEMBRIĜU

Ĉu vi scias kiom da anoj EAB havas en la Jaro 1987?
17 membrojn. Ĝi sopire malgraŭ pacience invitis kaj atendis. Sed vi ne aperis. Tial ĝi nun, SAMIDEANE, venas antaŭ vi kaj postulas:
PLENIGU LA SPACETOJN SUBE KAJ RESENDU LA ANSLIPON AL NI.

(KUN LA ĈEKO, KOMPRENEBLE)

---

ASSOCIAÇÃO BRASILIENSE DE ESPERANTO - Ficha de inscrição para 1988.

Nome ____________________

Endereço ____________________

CEP __________ Telefones(res.(__________) trab.(__________)

Local de trabalho ____________________

Profissão ____________________

TAXA de CZ$ 300,00 - anual (Obs.: até janeiro de 1988) Nº ________

Brasília, _____ de __________ de 198__.

Assinatura ____________________

Unu post la alia legas por ĉiuj la frazojn originalajn kaj tradukitajn;

b) Legado grupa de la libreto "Konstrui novan Ponton" - Ĉiu ano legas proksimume kvar paĝojn. La ceteraj aŭdas atente. Ĉiu kiu ne sukcesas kompreni la enhavon povas haltigi por pridemandi la grupon.

3-a renkontiĝon

a) Ĉiu grupano legas dum 30 minutoj paĝojn de la libro ricevita en la unua renkontiĝo serĉante kaj kopiante frazojn en kiuj troviĝas specifajn frazstrukturojn de esperanto. ekzemple:
MI NENION GAJNAS - komparu - Eu NÃO ganho NADA.
Ĉiu prezentas la strukturojn de si trovitaj. Post la kontrolo de la grupo, ĉiu grupano faras tri frazojn sekvante ĉiun apartan strukturon. Post ĉiu legas siajn frazojn kaj la grupo devas kontroli la kunrilatigo de la strukturoj.

RIMARKOJ: La ceteraj procedoj, ĝis tiu de la deka renkontiĝo, estos donitaj al ĉiu grupano poste.
Pri la bibliografio respondecas EAB.

---

• ĈU VI HAZARDE MEMORAS KIAL ĈI-SUBA SPACO ESTAS BLANKA?

R. ĈAR VI DEVAS SENDI LA ANTAŬFLANKAN ANSLIPON AL EAB.